Berlin, 11.03.08

Tre estimata sinjorino Lapenna,

Bedaŭrinde, pro serioza malsano, mi eĉ post via dua letero ne povis tuj reagi skribe. Mi telefonis al vi, sed la aŭtomato daŭre neis eblan kontakton „per tiu ĉi numero". Mi petas vin pardoni la malfruiĝon de mia reago al via grandega donaco, pro kiu mi ne havas vortojn danki. Sur mia labortablo kuŝas amaseto da neresponditaj leteroj.

Mi tamen legis du tekstojn: *Esencaj kaŭzoj de mia eksiĝo* kaj via ege grava kaj admirinda sintezo *La du konceptoj de Ivo Lapenna*. Se mi havintus ilin pli frue, mi estus skribinta pli bone informita. Dum UK en Berlin mi havis la intencon paroli kun vi; mi vidis vin akompanatan de Buller kaj poste eksciis ke «Esperanto» dediĉos numeron al memoro de Lapenna, kaj esperis ekscii de tio pli multe, sed la necesa honorigo ne okazis.

La aliaj artikoloj de Lapenna kaj pricipe la diskoj donos al mi tute klarajn konojn pri tiu ĉi senkompara personeco de la E-movado. Mi havas la impreson, ke, inter la vivantoj, mi komprenas plej bone lian valoron, ĉar en Rumanio mi mem faris kvazaŭ tion, kion li faris internaciskale. Post mia forpaso, la diskoj kaj la aliaj materialoj estos donacitaj al Esperanto-Domo en Berlin.

Kompreneble, el mia libro vi povas preni ĉion, kion vi kredos bonvena. Eĉ forlason de netaŭgajn asertojn en aliaj artikoloj vi povas forstreki.

La artikoleton de Blanke en «der esperantist» mi ne plu havas, ĉar post la finskribado de la ampleksa libro mi forjetis ĉiujn ne plu necesajn artikolojn.

Kun respektplenaj salutoj kaj
granda admiro pro viaj agoj,

via I.F. Bociort